# ROZŘEŠENÍ OTÁZKY POMOCNÉHO JAZYKA DOROZUMÍVACÍHO.

Předmluva ku prvé knize o esperantu. Napsal Dr. *L. L. Zamenhof.* Přeložil *Rud. Hromada.* — (Dokonč.)

III. otázka.

Dokončil jsem právě svrchu rozbor hlavních vlastností svého jazyka; ukázal jsem výhody, jež skýtá tomu, kdo se mu naučí; dokázal jsem, že jeho úspěch nikterak nezávisí od toho, s jakým zájmem se ve veřejnosti setká; že má opravdu právo zváti se jazykem mezinárodním, i kdyby nikdo nechtěl slyšeti jím mluviti; že vskutku dá každému, kdo se mu naučí, možnost, srozuměti se s každým cizincem, kterékoliv národnosti, jen umí-li čísti a psáti. Ale jazyk můj položil si ještě jiný cíl: nestačí mu býti jazykem mezinárodním, má se ještě státi jazykem všeobecným, t. j. dosáhnouti toho, aby většina lidí uměla jím plynně mluviti. Počítati na podporu veřejnosti k dosažení tohoto cíle, bylo by stavěti na základě velice vratkém a fantastickém, poněvadž velká většina veřejnosti nepříliš ráda dává svoji podporu čemukoliv, vyžadujíc, aby se jí podávaly věci již úplně hotové. Proto také snažil jsem se najíti prostředky, jak přijíti k tomuto cíli nezávisle od podpory veřejnosti. Jedním z prostředků, o němž se rozšířím podrobně, pozůstává v jakémsi všeobecném hlasování. Jestliže každý čtenář dobře si uváží, co jsem svrchu vysvětlil, přijde k závěru, že studium jazyka mezinárodního mu představuje nepopíratelné výhody a že dostatečně odměňuje velmi nepatrnou námahu, kterou si dal s naučením se mu; mohl bych tedy doufati, že jazyk nalezne od počátku velké množství přívrženců. Ale jsem raději připraven na nepříznivé okolnosti, než abych se hýčkal optimistickými nadějemi. Připouštím, že se nenalezne hned podobných osob, že bude jenom velice málo těch, kteří shledají ve znalosti tohoto jazyka výhodu dosti značnou, aby mu opravdu věnovali hodinu svého času; že velká většina mých čtenářů věnuje jenom málo pozornosti mému dílu a nerozhodne se snadno učiti se mu, buď na jedné straně z pochyby, že jazyk nenahradí jim dostatečně jejich námahu, nebo na druhé straně v obavě, aby nebyli nazváni snílky — příjmím, jež v naší době většina lidí považuje za jakousi hanbu a jehož se bojí více než čeho jiného. Co

je tedy potřebí učiniti, aby tyto masy lhostejných a nerozhodných byly podníceny dáti se do učení jazyku mezinárodnímu? Kdyby náš zrak mohl proniknouti duši každého z těch lhostejných, bezpochyby bychom tam viděli následující: že v základě není nikdo proti zavedení řeči mezinárodní, že všichni naopak přijali by ji s radostí, ale že každý by chtěl, aby bez nejmenší námahy a bez nejmenších obětí s jeho strany se stalo to, že jednoho krásného jitra většina lidí by uměla rázem mluviti tímto jazykem; jest zřejmo, že pak většina lidí, i nejlhostejnější, přispíšila by si naučiti se mu, poněvadž šetřiti v tomto případě trochu práce k naučení se jazyku, jenž má vlastnosti svrchu vyložené a který je již znám většině, bylo by — mírně řečeno — velikým dětinstvím.

Ve snaze, abych podal veřejnosti dílo zcela hotové, a aby bez nejmenší námahy a oběti se strany kohokoliv bylo jednoho dne dokázáno, že valná část osob vzdělaných se mu již naučila nebo slíbila veřejně se mu učiti — počínal jsem si následovně:

Tato brožura bude rozeslána do všech dílů světa. Nevyžaduji, aby se kdo učil mému jazyku, nebo aby někdo dělal cokoliv, co vyžaduje práce a způsobuje výlohy, žádám každého čtenáře, aby laskavě vzal do ruky péro, vyplnil jeden z přiložených blanketů a poslal mi jej. Dotyčný blanket obsahuje následující:

Podepsaný slibuje naučiti se jazyku mezinárodnímu, vynalezenému drem Esperanto, jakmile deset milionů lidí složí veřejně tentýž slib.

Následuje podpis a pečeť podepsaného (osoby, které nemají vlastní pečeti, mohou ji nahraditi pečetí jiného, jež v tomto případě odpovídá za pravost podpisu) a na druhé straně jméno zřetelně napsané s přesnou adresou podepsaného. Co se týče toho, kdo zásadně bude míti jakékoliv námitky proti jazyku mezinárodnímu, ten nechť laskavě mně pošle dotyčný blanket přeškrtnuv tekst vepsáním slova: kontraŭ (proti); kdežto ti, kteří budou chtíti se jazyku učiti buď jak buď nezávisle od počtu slibů podepsaných, ti nechť laskavě přeškrtnou druhou část tekstu a nahradí ji slovem: sen'kondiĉ'e (bezpodmínečně).

Podpis takového slibu nevyžaduje žádné námahy, nevynutí žádné oběti a nezavazuje k ničemu v případě nezdaru podniku: zavazuje k naučení se jazyku teprve, když 10 milionů lidí se mu naučilo. Ale pak bude zřejmo, že se strany podepsaného nebude to již obětí, nýbrž činem, který by si pospíšil udělati i kdyby k tomu nebyl nucen nějakým slibem. Naproti tomu každý podpis blanketu pošine o krok

uskutečnění tradicionelního ideálu lidstva a to bez jakékoliv oběti individuelní.

Jakmile počet slibů, jež mně budou poslány, dosáhne cifry 10 mil., všechna jména podepsaných budou uveřejněna zároveň s jejich adresami ve zvláštní knize a druhý den po vyjití této knihy bude zjevno, že 10 milionů lidí se zavázalo navzájem učiti se řeči mezinárodní, a otázka bude rozřešena.

Jestliže podpis, přispívaje k uskutečnění vznešeného ideálu, nevyžaduje od podepsaného žádné podpory mravní nebo hmotné a neobtěžuje jej v ničem, mám právo doufati, že nikdo neodmítne jej dáti.

Odmítnutí za těchto okolností nemohlo by býti nazváno nedbalostí, nýbrž opravdu hříchem — hříchem proti lidskosti; to by nebyla již toliko lhostejnost k obecnému dobru, nýbrž odpor prováděný zúmyslně a nemohlo by býti vysvětleno jinak než bázní aristokrata rodu, peněz nebo vědy, že by viděl své jméno vyjímati se v téže řadě, co jméno osoby třídy nižší. Ale odvažuji se doufati v zájmu cti lidstva, že se najde jenom málo osob, které z důvodů tak nicotných by chtěli vaditi rozvoji díla tak důležitého pro celé pokolení lidské.

Není pochyby, že se nenalezne nikdo, kdo by v zásadě měl nějaké námitky proti pouhé skutečnosti zavedení jazyka mezinárodního, ale mohli by se najíti takoví, kteří neschvalují jej pro formu, pod kterou jej předkládám. Tyto úsilovně žádám, aby mně laskavě poslali odůvodněné námitky namísto slibu svrchu zmíněného. Nicméně povinností každé osoby jakéhokoliv věku, pohlaví nebo postavení společenského je, dáti hlas jakýkoliv, tím spíše, že dáti jej vyžaduje několik minut k vyplnění blanketu a výloh několika haléřů porta.

Ti, jichž jména nebudou v knize hlasovací, buď mezi stoupenci, nebo mezi odpůrci, nebudou míti potom ničeho, čím by dodali váhy svému ospravedlňování. Aby pak nikdo nemohl se vymlouvati na to, že nevěděl, co se na něm žádá, budou učiněna dostatečná opatření, aby tato výzva nebyla neznáma. Žádám všechny redakce, aby laskavě otiskly obsah mého vyzvání a také každého zvláště, aby sděloval můj návrh všem svým přátelům a známým.

* * *

Takové jsou výklady, jež měl jsem za nutny předeslati o svém díle. Jsem dalek tvrditi, že jazyk, který zde navrhuji, je jazyk dokonalý, že nic by nemohlo ho předčiti; ale snažil jsem se, abych

pokud možno vyhověl všem požadavkům řeči mezinárodní. Teprve, když jsem dosáhl rozřešení všech úloh, jež jsem si položil, teprve pak jsem se rozhodl předložiti toto dílo veřejnosti. Ale jsem jen člověk, takže jsem se mohl mýliti; mohl jsem se dopustiti některých chyb neodpustitelných; mohl jsem opomenouti dát řeči pravidla, jež by jí mohla býti velice užitečna. Proto před uveřejněním úplného slovníku a vydáváním knih a časopisů, podávám svoje dílo na dobu jednoho roku k laskavému schválení veřejnosti, obraceje se ke všem vzdělancům s prosbou, aby mně laskavě sdělovali svoje mínění o mém jazyku, jejž navrhuji. Nechť každý, kdo má nějaké námitky, mně laskavě sdělí písemně změny, jichž zavedení považuje za užitečno. S povděkem zužitkuji všechny údaje, jež se mi ukáží nepochybně praktické bez opouštění základu jazyka, totiž, lehkosti jeho studia a jeho naprosté způsobilosti sloužiti ke stykům mezinárodním neodvisle od počtu stoupenců.

Po případných změnách, jež budou předmětem zvláštní brožury, jazyk dosáhne formy stálé a definitivní. Jestliže nicméně tyto opravy by se ukázaly ještě nedostatečnými, nebudiž zapomínáno, že jazyk sám není uzavřen v budoucnosti všem možným zlepšením, ale s jedním rozdílem, že pak právo měniti na něm cokoliv nenáleželo by již autoru, nýbrž autoritě zvláštní akademie, všeobecně uznávané Čím těžší je jazyk mezinárodní utvořiti a způsobiti jeho přijetí, tím více je potřebí přivábiti naň pozornost podpůrnou. Bude-li jazyk jednou přijat a užívání jeho stane se všeobecným, stálá akademie bude pak moci snadno a nepozorovaně do něho zavésti všechna zlepšení, jež budou považována za nezbytná, i kdyby měly do něho přijíti časem takové změny, že by nynější jazyk změnil se tím k nepoznání. Dále prosím čtenáře, kteří ještě nebudou spokojeni s mým vynálezem a kteří následkem toho by chtěli mi poslati námitky namístě slibu, aby tak učinili jen v případě, že by měli důvody vážné.

Svěřuji tedy laskavé pozornosti publika tuto práci, která mně stála tolik námahy a času. Odvažuji, se těšiti se nadějí, že každý, jemuž zájem celého lidstva je ještě drahý, poskytne mi svojí opory, kolik jen bude v jeho moci. Okolnosti každému naznačí, v čem může prospěti podniku; dovolím si pouze připoutati pozornost osob nakloněných řeči mezinárodní na hlavní bod, na nějž musíme nyní upříti svoji pozornost: zdar hlasování. Nechť jen každý dělá kolik může a to postačí, abychom v čase blízkém dosáhli ideálu, o němž sněno ode dávna, totiž: jazyka společného všemu lidstvu.

(Následuje: Úplná příručka jazyka mezinárodního esperanto).

# BONAJ OKULOJ.

Verkis *J. Otcovský.*

Certe ofte ni aŭdas la esprimon: „Li havas tiajn bonajn okulojn“. Kaj, se ĉi tiuj kvin vortoj tuŝas niajn orelojn, tiam certe la plimulto de aŭdantoj ne donas al ili pli gravan signifon ol al ĉiu alia ordinara esprimo. Neniu pripensas ĉi tiujn vortojn, kian signifon ili havas precipe por la individuo, kiun la esprimo rilatas. Nek la posedantoj de bonaj okuloj scias, kian grandan rolon iliaj bonaj okuloj ludas en ilia propra vivo.

„Vi havas tiajn bonajn okulojn“ diras la patrino, kiam ŝi al sia filo, kiu forlasas la hejmon por serĉi la okupon en la fremdujo, surpremas dum la disiĝo eble la lastan kison sur lian frunton dirante en ploro: „Vi estos eble feliĉa“. Eble!

„Li havas tiajn bonajn okulojn“ diras unu sinjoro pan-donacanto al la alia, „sed bedaŭrinde mi ne povas bezoni lin por la pli grava ofico.“ „Mi ankaŭ ne“, respondas la alia. „Al tiaj homoj oni tamen ne povas doni la oficon pli altan neparolante eĉ la oficon estran. „Rigardu sole iajn okulojn, kiel elokvente ili parolas sole pri la boneco“. „Certe, certe, tiuj ĉi homoj ŝajnas enkorpiĝinta boneco“, aldonas la alia.

Per ĉi tiu interparolo estas do la sorto de nia bonulo por ĉiam decidita.

Oni ne miru. Tia homo ne povas esti uzata por la subpremado, ekspluatado kaj sklavigado de al li subalternaj oficistoj kaj laborantoj, aŭ pli bone teknike esprimite „laboraj fortoj“ (HP)! Tiun ĉi malsaĝon faros certe neniu sinjoro pan-donacanto. Kien venus ankaŭ la mondo, se la popolo estus gvidata de tiaj viroj? Kiu rememorigus tiam al la laborantaj subalternaj homoj ilian bestan devenon? Tiam estus tamen baldaŭ ĉiuj homoj bonaj kaj tio ĉi estas dume ankoraŭ ne ebla.

Sed mi volis paroli pri bonaj okuloj. Ĉiu certe konas iun tian posedanton de bonaj okuloj kaj se iu la suprediritan esprimon kiel signon de la rekono de ĉi tiu ekzistaĵo ankoraŭ ne aŭdis, tiam la jena esprimo estas al li certe ne nekonata: „Tia malsaĝa bonulo.“

„Tia malsaĝa bonulo“ diras la popolo, se al iu el ĉi tiuj bonuloj okazis malfeliĉo, kaj tio ĉi estas tre ofte.

Tiun aŭ alian bonulon, oficiston, bedaŭras la popolo, se li estis en la ofico ree preterita de pli juna oficisto, kiu krom la protekto per nenio alia distingiĝas.

Jen denove bedaŭras la popolo la kampiston aŭ metiiston, kiuj pro siaj bonkoreco, sincereco kaj senlima malavareco malriĉiĝis.

Sed ankoraŭ aliaj cirkonstancoj naskas ĉi tiun esprimon, el kiuj precipe la jena meritas atenton:

Ne sufiĉas, ke ĉi tiuj bonuloj estas en ĉiuj cirkonstancoj trompataj de fremdaj personoj, ili estas ankoraŭ tre ofte trompataj de siaj propraj edzinoj. Mi estas konvinkita, ke la pli granda parto de edzoj trompataj de siaj propraj edzinoj apartenas al la klaso de niaj bonuloj. Oni ne miru, ke iuj vantaj, iluziaj, moderne pensantaj sinjorinoj-edzinoj trompas siajn edzojn kun fremdaj sinjoroj. Ĉu ne estas malfeliĉo por junaj, belegaj, fieraj kaj pasiaj edzinoj havi la edzon, kiu estas ĉiam kun ĉio kontenta, en ĉio modesta, ĉiam pacama, tolerema, trankvila, sincera, en sia eksteraĵo kaj en ĉiuj siaj faroj simpla, per unu vorto bona? Ĉu tiaj edzinoj ne havas kaŭzon envii al aliaj edzinoj, kies edzoj estas elegantaj, energiaj, interesantaj, amuzaj, pasiaj kaj en la socia vivo pli alte starantaj, do sekve tute aliaj ol iliaj edzoj. Kia do miro, ke ankaŭ iuj belseksulinoj deflankiĝas de la ĝusta vojo. Oni tamen scias, ke por la edzeca feliĉo ne sufiĉas sole la amo modesta, amo kaŝita, kiu sin esprimas sole en la fidela sincereco, ne, tio ĉi ne estas ĉio. La nuntempa vivo postulas por ĉiu homa faro argumentojn videblajn, kiujn niaj bonuloj bedaŭrinde ne povas alporti.

Ili estus certe plej malfeliĉaj ekzistaĵoj sur la terglobo, se ne ekzistus pli granda potenco, kiu juĝas juste kaj repagas laŭ la merito bonon. Jes, ĝi estas jam tiel sur la mondo arangita. Kiel ĉiu mola objekto ĵetita kontraŭ la objekton malmolan resaltos de ĉi tiu sen ĝin difekti, tiel same neniu malbonaĵo celita kontraŭ la armitan homon per la boneco, tiun ĉi laŭ la okultaj leĝoj universaj ne vundos.

Kian do signifon povas havi la suprediritaj malbonaĵoj por la homo, kiu kutimis rigardi la mondon kiel stacidomon sur la senfina vojo, kiu prenas la vivon mem kiel la longan sonĝon; kiu sin sciigis, ke ne povas ekzisti feliĉo, kiam ekzistas pli multe da malfeliĉo kaj tio en lia apuda proksimo, tuj trans la muro, kie sonas la ploro kaj enestas la malespero pro la trompita vivo, ke ne povas ekzisti amo, kiam ekzistas pli da malamo kaj tiu ĉi lasta ne estas ankoraŭ vera, ĉar alie la homoj sin devus reciproke mortigadi. Kian do signifon povas havi por li la homa malŝato, la edzeca trompo k. t. p. Neniuj ĉi tiuj malbonaĵoj povas lin do pereigi kaj, se eĉ ĝi okazus, kio estas la morto mem? Ho li scias bone, ke ĝi estas revekiĝo al la vivo efektiva.

Se oni nun pri ĉio ĉi konsideras, ĉu oni ne venos al la opinio, ke la posedantoj de bonaj okuloj progresis en la humana evolucio pli malproksimen ol ĉiuj homoj aliaj, homoj kun aliformigitaj okuloj? Kaj se oni plu konsideras pri la kaŭzo, kial ĉiuj homoj ne havas bonajn okulojn, kiam tamen ĉiuj naskiĝis sub egalaj kondiĉoj? Ĉu ne estus tiam la problemo de la dezirinda humaneco por ĉiam solvita? Kie do kuŝas

la kaŭzo de la malo? Kie serĉi la ĝustan respondon? Certe en la unua komenco:

Kio ravas tiel potence la maturan homon, se li ekvidas infanojn? Kia sorĉo ĉi tie efikas, ke li ĉe la sola ekrigardo de iu ajn infano fariĝas pli afabla kaj lia humoro pliiĝadas ĝis la gajeco? Kio ĝi estas? Belegeco de la infano certe ne, ĉar ĉiu infano ĉi tiun preferon ne posedas kaj lia kvankam ridinta sensenca babilado ĝi ankaŭ ne estas. Kio do ĝi povus esti?

Ho! nenio alia ol la okuloj ĝi estas kaj okuloj sole bonaj. Ne eble belegaj, kiel iu supozus. Ne. La infanaj okuloj estas certe belaj, ĉar ili estas grandaj, preskaŭ ĉiam bluaj, senkulpaj kaj rigardas nin kun tia trankvilo kaj certo, ke oni ĝin devas admiri. Belegaj aŭ ĉarmaj ili ne povas esti, ĉar ili estos subigitaj al multaj fiziologiaj kaj ankoraŭ pli multaj psikologiaj ŝanĝoj, kiuj, kaj precipe la lastaj donos al ili laŭ tio, kiel tiuj ĉi ŝanĝoj estos elvokataj iom post iom, la certan karakteron individualecan.

Oni scias, ke la okuloj estas la plej bona ilo por montri eksteren la tutan karakteron homarecan, aŭ alie dirite, en ili estas tuj ĉiuj devenaj decidaĵoj de la mistera homa spirito kiel en la spegulo rebrilantaj. Kaj kian rebrilon do ni povas observi en okuloj de infanoj? Rebrilon de absoluta trankvileco, do rebrilon sole de boneco.

Kiamaniere estos do la supre diritaj ŝanĝoj alkondukataj? Kiu donas al ili la unuan iniciativon? Oni certe respondos: La edukado. Bone, do la edukado. Tiamaniere estas la gepatroj la unuaj, kiuj per la reakcia edukado aŭ per la absoluta indiferenteco al kia ajn edukado ĝenerale donas la unuan iniciativon por la ŝanĝo de infanaj bonaj okuloj plantante en iliajn cerbojn la unuan semon de venena kreskaĵo, kiu havante bonan teron malrapide ĝermas kaj prosperas, tiel ke neniu ĉi tion rimarkas.

Bona apogilo de ĉi tiu edukado estas certe la bonstato kaj altrangeco de gepatroj, kiuj kondiĉoj produktas en infanoj fierecon kaj maldiligentecon. Barbare kaj ĉe la ĉeesto de fremdaj personoj farita punigado de viglaj infanoj unuflanke, malriĉeco kaj sensignifo de gepatroj en la homa societo aliflanke alportas al ili obstinecon kaj malamon, kiuj ĉi malvirtoj produktas poste ĉiujn malvirtojn ceterajn. En la lernejoj ricevas iuj el ĉi tiuj malvirtoj fortan apogilon per diversa protektado kaj per impresigado de trograndiĝanta kaj sensenca patriotismo. Kaj fine la nuntempa publika devizo: superi unu la alian, estu la kondiĉoj al ĉi tio kia ajn, ĉar tamen ĉiu celo sanktigas la rimedon, ne restos ankaŭ sen influo.

Kaj nun je aliformigitaj okuloj provizita kaj je la dirita devizo armigita eniras la juna generacio en praktikan vivon, kie ĝi estos ludonta gravajn rolojn kaj faronta decidaĵojn pri la sorto de la tuta homaro. Kaj ĉio ĉi tio estas do sole la sekvo de la ricevita edukado.

Sed kiel do ĝi okazas, ke unu kvanto de la junuloj, kvankam malgrandega, eliros el ĉi tiu lernejo sen aliformigitaj okuloj? Ĉu ili ricevis la edukadon supernaturan? Certe ne. Ni ja scias, ke ĉi tiuj bonuloj apartenas precipe al la klaso malriĉa.

Kia mistero do ĉi tie efikas?

(Křivoklát, en novembro 1910.)

---

## SAĜO DE LA VIVO.

Boheme verkis *Fráňa Šrámek.* Tradukis *Ant Bartoš.*

Sur vojeto inter du bedoj kuŝis renversita verŝilo. Sur la bedoj floris rozoj, diantoj kaj trikoloretoj — sed kiel ili malgaje klinis siajn kapetojn al la tero! Jam dum du tagoj la suno, granda kaj blanka, brulis super ili kaj neniu verŝetis akvon sur ilin. Vespere, la unuan tagon, ili ekĝemis kaj diris: La kapo doloras nin kaj ni ne povas ekdormi. Kaj kiam la duan tagon la suno subiris kaj la nokto, varmega kiel la tago, estis alvenanta, ili diris mallaŭte: Hodiaŭ post la noktomezo ni mortos; papilio nokta, kisu nin lastfoje...! Sed la nokta papilio komplimentis al la rozoj sole per silenta gesto, ordigis sian veluran manteleton kaj flugis al proksima lumigita fenestro. Kaj la rozoj plendis: Jam neniu kisas nin plu. Kaj la diantoj kliniĝis al trikoloretoj kaj petis: Rigardu nin lastfoje per viaj bluaj okuletoj. La trikoloretoj rigardis supren la diantojn, profundsente kaj fidele, kaj ripetis kelkafoje: Ni estos mortantaj bele, ĉar ni mortos en via bonorodo.

Poste antaŭ la noktomezo iom da vampiroj preterflugis. La fluganta lumetoj estis belaj kiel vagantaj steletoj kaj la bedaj floroj longe rigardis ilin, ĝis iliaj okuloj pleniĝis per larmoj. Tio estis roso. Kaj la floroj tiun nokton ankoraŭ ne mortis.

La trian matenon ili havis jam tiel sekiĝintajn kaj malfortajn voĉetojn, ke unu jam preskaŭ ne aŭdis la alian. Ili provis alvoki la verŝilon, kuŝantan inter la bedoj. Fine ili sukcesis.

„Kial vi, senkompatema, ne surveŝas sur nin?"

Ili devis kelkafoje ripeti la demandon, ĉar la verŝilo ĵus interparolis fervore kun kelkaj formikoj, kiuj kuris sur ĝi. Fine ĝi respondis per profundtona voĉo: „Mi ne povas, antaŭ kiam homo venos, plenigos min per akvo kaj eksvingos per mi super viaj bedoj . . .!"

„Kaj kial la homo ne venas?“

Tio estis vere naiva demando; la verŝilo jetis despektplenan rigardon sur la florojn kaj murmuris sole: „Ili estas paradvestitaj kaj parfumitaj, sed multon da prudento ili ne ricevis . . .“

Papilio preterflugis kaj ĝi estis amanto de la rozoj. Ĉiam ĝi haltis tie ĉi kaj kun la rozoj ekkaresis, eĉ la diantojn ne forgesis.

Kaj la rozoj petis: „Papilieto, venu, per kisoj konsolu nin, malfeliĉajn!“ Sed hodiaŭ al la papilio ne plaĉas kisi ilin.

„Kompatu nin, vi kara, ora . . .“ La papilio sole per flugiloj ekbrilis en la suno. „Mi tre bedaŭras, belulinoj, sed viaj vangoj estas velkintaj kaj la lipoj sekiĝintaj . . . Mi flugos ien alien al viaj fratinetoj . . .“

„Oni ne surverŝis sur nin . . .“ plendis la rozoj, diantoj kaj la trikoloretoj. Kaj ili rakontis al la papilio, kion ili sciiĝis de la verŝilo. Ili diris ankaŭ tion, ke la verŝilo ne scias, kial la homo ne venas. Ĉu eble li, la papilio, povus al ili diri tion?

La papilio fine kompatis ilin. „Atendu momenton“, ĝi diris kaj flugis al la malfermita fenestro.

La rozoj ekflamiĝis pro atendado, kaj forgesis eĉ tion, ke ili havas velkintajn vangojn kaj sekiĝintajn lipojn. Kaj ili diris al la diantoj kaj trikoloretoj: „Ĝoju, la papilio sciigos nin, pro kio la homo ne venas..!“

Fine la papilio revenis; li flugis iel pene kaj malgaje. Li sidigis sin sur unu rozon kaj paroletis en ĝian orelon: ke la homo sidas tie en la ĉambro, la kapon li apogas sur la manplatoj kaj plendas: Dio, kial vi prenis de mi mian solenaskiton? Jes, li tiel plendas . . .

„Sciu, mi estas pro tio tre ĉagrenigita, mi devas ien flugi por konsoliĝi . . .“ Kaj jam, jam ĝi volis forflugi.

„Mi petas vin, atendu ankoraŭ sole momenton . . .“ petis la rozo kaj rakontis al la floroj, kion la papilio sciigis al ŝi.

„Ĉu solenaskiton oni prenis for li . . .?“ demandis unu la alian. Kaj ĉiuj subite ekmemoris la blondharan knabeton, kiu antaŭe kuradis tie ĉi inter la bedoj kaj nun li jam ne kurados plu.

„Kaj kiu lin prenis de la homo . . .?“

„Dio.“

„Kaj kiu estas dio . . .?“ Unu rigardis konfuzite la alian. Neniu aŭdis, kio estas dio.

„Eble la papilio scias . . .“ La papilio kunpremis forte la flugiletojn kaj tre ekpensis. Ne, ne, neniam ĝi aŭdis ion similan.

Ili komencis peti ĝin; ĝi povus ie demandi, kiam ĝi, la papilieto kara, ora, ĉirkaŭflirtas dum la tuta tago . . .

Ili petis kaj petis. Fine ĝi tion promesis al ili. Ĝi flugis kaj apud rive-

reto renkontis libelon. „Ho, ĉu vi ne scias, kie mi sciiĝus, kio estas dio?“

La libelo turniĝis en la aero, ekbrilis per ora kaj blua koloro kaj ekridegis: hihihi, hihihi . . .

„Pri kio vi ridas?“ miris la papilio.

„Pri kio mi ridas, hihihi . . . Kiel vi nomas tion?“

„Dio.“

„Hihihi, ridinda vorteto, hihihi . . . Mi rapidas, hihihi . . . Mi devas ĝoji pro la suneto, hihihi . . .“ Kaj ĝi rapide malproksimiĝis, ridante kaj en la aeron ĵetante rebrilon de ora kaj blua koloro.

„Freneza libelo!“ diris la papilio kaj sidigis sin sur bordon de la rivereto meditante, kiun ĝi demandus nun.

„Vi, rivereto, ĉu vi ne scias, kie mi sciiĝus, kio estas dio?“

Sed la rivereto murmuretis plue la sian: blum — blim — blim, blum — blim — blim . . .

„Nenian blum — blim — blim, mi deziras scii, kio estas dio“, koleris la papilio.

„Mi rapidas, mi rapidas, mi devas flui, blum — blim — blim . . . .“

Subite venteto preterflugis. „Ho, venteto!“ Kaj la papilio ripetis sian peton.

„Malsaĝaĵoj, malsaĝaĵoj! Mi rapidas, mi rapidas! Mi devas blovi!“

Sed nia papilio estis jam indignita kaj ĝi nepre ne kontentiĝis per ĝia respondo. Ĝi rapide sekvis la karan venteton kaj tiel persiste ĝi petis, ĝis la venteto promesis dumvoje demandi iun.

La papilio dume sidigis sin sur unu krizantemon kaj atendis. Ĝi atendis longe. Fine la venteto revenis. Ĝi ĉirkaŭflugis rapidege la papilion, ke ĝi detenis spiron, kaj la venteto komencis rakonti. Ĝi demandis ĉie, sed vane. Neniu sciis, kio estus dio. Eĉ la suneto ne sciis kaj tamen ĝi scias ĉion.

„Tiel . . . kaj nun mi rapidas, mi rapidas, mi devas blovi . . .“ kaj la kara venteto jam denove malaperis.

Kion nun? Kaj la papilio leviĝis kaj flugis returnen.

La rozoj, diantoj kaj la trikoloretoj jam atendadis — sed kiel la papilio estis surprizita: ĉio estis kvazaŭ juniĝinta! Grandaj, arĝentkoloraj gutoj brilis sur brustoj de la rozoj, la ruĝaj diantoj estis kvazaŭ surŝprucigitaj per freŝa sango kaj la trikoloretoj estis levantaj la kapetojn unu al alia kaj permesis, ke la suno elkisu el iliaj okuloj larmetojn de feliĉo.

Antaŭ ĉio rakontis la rozoj: Apenaŭ la papilio matene forflugis, la homo eliris el la domo, prenis la verŝilon kaj surŝprucis la ambaŭ bedojn.

Ho, tiu bona homo! Kaj malbona dio prenis for li la knabeton! Nu, papilieto, kio do estas dio, rakontu rapide!

Kaj la papilio rakontis ĉion, kio okazis al ĝi. La floroj ĉagreniĝis denove.

Subite la papilio faris neordinaron geston, kvazaŭ oni frapus sur la frunton kaj ekvokis: „Ho, ni stultaj, stultaj, stultaj!“

Ĝi turniĝis kelkafoje ĉirkaŭ kapturnanta arko en la aero kaj rapide surflugis sur la plej belan rozon, per la flugilètoj tute alpremiĝis al la floro, paroletante gajege: „Mi volas kisi vin, mi volas ĝoji pro vi kaj pro la suno . . . Ho, mi devas, mi devas!“

Kaj ĉiuj floroj subite ektremis kvazaŭ ili estus forskuantaj malĝojon kaj kantis: „Ni volas ĝoji pro la suno kaj roso, pro ventetoj kaj papilioj . . . Ni devas, ni devas . . .!“

Subite la venteto transflugis la ĝardenon kaj ekdirektis al la papilio. „Holaho . . .! Mi flugas al vi, mi volas diri ion al vi. Mi jam rememoris, holaho, rememoris. Nu, aŭskultu! Kiam mi alflugis iamfoje inter homojn, mi aŭdis tiun strangan vorteton: dio. Kia stranga vorteto, hihihi . . .!“

Ĝia rido sonas kiel sonorileto kaj fajfileto.

Kiam homoj elparoladis tiun vorteton, aspektis ĉiam tiel ridinde kvazaŭ ili timus, ke tiumomente fulmo ekbatos ilin. Ho, kiel tio estas ridinda! Ĉu vi memoras, kiam vi matene demandis la libelon? Ĝi ridis al vi: Mi rapidas, mi devas ĝoji pro la suneto, mi devas flugi. Kaj la rivereto: Mi devas flui. Kaj mi: Mi devas blovi. Sed homo estas kompatinda. Demandu lin, kiel nin kaj li ne respondos: mi rapidas, mi devas vivi, mi devas ĝoji — ne! Li forgesos, ke li estas vivonta, ke li estas ĝojonta, li irados kaj rezonos, kiamaniere li respondus plej saĝege. Jam tre longe mi flugas tra la mondo kaj mi scias, kial ĝojo kaj feliĉo tiom malofte venas al homoj. Ĉar ili ne ricevas ĝojon kaj feliĉon kiel ion, kion ili devas voli, devas kaj devas, sed ili ricevas ĉi tion ambaŭ de iu — ordinare ili nomas tiun ĉi dio — kiel donacon kaj favormontron, kaj se ili ricevas tion, rezonas, pro kio ili meritas tion kaj kiamaniere ili povus esti dankemaj pro tio, kaj se, kontraŭe, ili ricevas doloron kaj malĝojon, rezonas ankaŭ, per kio ili pekis . . . Kaj tiele ili dum la tuta vivo traktas kun iu, kiun ili elpensis, demandas tiun, kiu respondas nenion kaj ili respondas al tiu, kiu demandas nenion. Tiel estas, miaj karaj . . .“

„Jes . . . tiel, tiel, tiel . . .“ vokis la floroj kun la papilio, la floroj klinis sin unu al la alia, ili proponadis sin al alflugantaj abeloj kaj la papilio kaŝis sin preskaŭ tutkorpe en ruĝekoloran mallumon de unu rozo, dume la fajfileto kaj la sonorileto malproksimiĝadis . . .

Estis antaŭtagmezo kaj la homo eliris el la domo. Li haltis inter la bedoj kaj duone fermis la okulojn, kvazaŭ li aŭskultus iun kanton. Kaj lia malgaja vizaĝo komencis heliĝi . . .

---

**PŮVOD JMÉNA „ESPERANTO".**

Vysvětluje Dr. *L. L. Zamenhof.*

. . . Jméno našeho jazyka není vymyšleno, hle jeho historie: Vydávaje první učebnici našeho jazyka přijal jsem spisovatelské jméno „Esperanto" (Doufatel); jazyk sám neměl vlastního jména a nazýval se „la lingvo internacia proponita de Esperanto" (jazyk mezinárodní navržený Esperantem). Z pohodlí počalo se užívati výrazu „lingvo de Esperanto" (Die Esperanto-Sprache, jazyk Esperanta, jazyk Esperanto); jiné výrazy, jichž někteří se pokusili užívati (na př. „la lingvo internacia" — jazyk mezinárodní — „la internacia" — mezinárodština —), ukázaly se nevhodnými a neujaly se, poněvadž nebylo dobře lze obecenstvu vyslovovati a pamatovati si je, a nepředstavovaly ničeho určitého (neboť pod „lingvo internacia" — jazyk mezinárodni — možno stejně dobře vyrozumívati volapük nebo jiné předložené návrhy). Záhy se ukázalo, že teprve jméno „Esperanto" (samo nebo se slovy jinými) odlišuje jasně jazyk náš od jiných, a mnoho přátel brzy počalo užívati v dopisech nebo článcích svých prostě pouhého slova „Esperanto" na př. „la afero Esperanto" — věc esperanta — „skribi en Esperanto" — psáti v esperantu — a p. Tak poznenáhlu vypěstilo se jméno jazyka našeho o jednom slově. Vida, že počáteční moje jméno spisovatelské přešlo na věc samu, a že je velice pohodlné, přestal jsem záhy vůbec užívati svého jména spisovatelského a ono zůstalo jen jménem věci samotné. Jméno „Esperanto" je samo o sobě úplně beze smyslu; ale nač třeba logiky v bezvýznamném podmíněném jméně? (Z „Esperantisto" 1890, pros., str. 60.) Přeložil *Hkb.*

**DEVENO DE LA NOMO „ESPERANTO".**

Klarigas Dr. *L. L. Zamenhof.*

. . . La nomo de nia lingvo ne estas elpensita, jen estas ĝia historio: Eldonante la unuan lernolibron de nia lingvo, mi prenis por mi la pseŭdonimon ‚Esperanto'; la lingvo mem havis nenian propran nomon kaj estis nomata „la lingvo internacia proponita de Esperanto". Pro oportuneco oni komencis uzadi la esprimon „lingvo de Esperanto" (die Esperanto-Sprache); aliaj esprimoj, kiujn kelkaj provis uzadi (ekzemple „la lingvo internacia", „la internacia"), montris sin ne oportunaj kaj ne enfortikiĝis, ĉar ili estis ne bone elparoleblaj, ne memoreblaj por la publiko kaj prezentis nenion difinitan (ĉar sub „lingvo internacia" oni povas egale kompreni la Volapükon aŭ aliajn proponitajn projektojn). Baldaŭ montriĝis, ke nur la vorto „Esperanto" (sole aŭ kun aliaj vortoj) klare diferencigas nian lingvon de la aliaj, kaj multaj amikoj komencis baldaŭ en siaj leteroj aŭ artikoloj uzadi simple la solan vorton „Esperanto", ekzemple „la afero Esperanto", „skribi en Esperanto", k. s. Tiel iom post iom ellaboriĝis unuvorta nomo de nia lingvo. Vidante, ke mia komenca pseŭdonimo transiras al la afero mem, kaj ke ĝi estas tre oportuna, mi baldaŭ tuj ĉesis uzadi mian pseŭdonimon, kaj ĝi restis sole kiel nomo por la afero mem. La nomo „Esperanto" estas per si mem tute senlogika; sed en sensignifa kondiĉa nomo kial ni bezonas logikon?

„Esperantisto" 1890, pĝ. 60 (dec.)

## REPORTOJ KAJ NOTIZOJ.

**Bohema deputitino.** Ĝis nun neniam ni raportis al la fremdlandaj legantoj pri la pli rimarkinda kaj — laŭ nia konvinko — pli ĝojiga okazaĵo el Bohemujo ol estas la kompletiga balotado de la deputito por la parlamento de la reĝolando Bohemujo en la balotdistrikto Mladá Boleslav - Nymburk. En tiu ĉi balotdistrikto post la morto de la ĝisnuna deputito (dr. Škarda) ĉiuj bohemaj politikaj partioj decidis elekti la virinon kiel deputiton. La burĝaj partioj voĉdonis por la bohema verkistino Božena Viková-Kunětická, la socialoj demokratoj por la redaktorino Karla Machová, la malamikoj de la balotrajto de la virinoj kaj reakciuloj balotis por la urbestro de Mladá Boleslav. Jam en la unua balotado (4. VI. 12) la virinoj ricevis la plej grandan nom-

bron da voĉoj (Kunětická 850, Machová 415 kontraŭ Matoušek 769) kaj en la necesa dua elekto (13. VI. 12.) oni ĉiuvoĉe balotis por la s-ino Božena Viková-Kunětická, kiu estis elektita deputitino. La aŭstria registaro rifuzas aprobi tiun ĉi balotadon, ankaŭ la germanaj deputitoj, ĉu reakciaj ĉu liberalaj, kontraŭstaras la aprobon pri la balotado, tial ne estas ankoraŭ certe, ke s-ino Viková-Kunětická eniros parlamenton, sed signifoplena kaj ĝojiga estas fakto, ke la bohemaj balotantoj per faro montris sian konsenton pri la balotrajto de la virino, ke en Bohemujo estis elektita la unua deputitino en la meza Eŭropo. Tio nin ĝojigas kaj tion ni fiere sciigas al la fremdularo, ĉu amika, ĉu malamika al la balotrajto de la virinoj. *Bšk.*

**Universala kongresa programo** aplikebla por ĉia kongreso, ĉu specialista ĉu ne: 1. Malfermo de la kongreso kaj prezento de eminentularo je la 9a horo. 2. Paŭzo por matenmanĝo; bufedo riĉe provizita. 3. Komuna fotografado de la kongresanoj. 4. Konsiliĝo pri tio, en kia formo oni devas sendigi la fotografaĵojn al la kongresanoj. 5. Diskuto pri la loko de la venonta kongreso. 6. Elekto de la prepara komitato por starigo de la programo de la venonta kongreso. 7. Komuna tagmanĝo; tostoj. 8. Komuna ekskurso. 9. Fermo de la kongreso kaj disiĝo. Tiu ĉi spritplena programo bonege taŭgas ankaŭ por multaj „kongresoj“, ankaŭ-kongresoj kaj kvazaŭ-kongresoj esperantistaj. Ni rekomendas. *H.*

**Amo kaj malamo.** Oni diras: Sole tiu, kiu scias multe malami, scias multe ami. Mi ne kredas tion; kontraŭe mia konvinko estas, ke tiu, kiu scias malami, ne scias vere ami. Se iu malamas la personon, kiun li pli frue pretendis ami, li neniam vere amis tiun personon. Mi ne scias imagi, ke iu povus malami la personon, kiun li pli frue estis vere amanta; se estas tiel, lia amo estis egoisma, la celo de lia amo ne estis la alia persono, sed li mem. La plej bona pruvo estas: la homoj multe malamas, tial ekzistas sur la mondo ne multo, sed malmulto da amo — da vera amo... *H. K. B.*

# KRONIKA A KOMENTÁŘ.

**Sjezd moravských a slezských esperantistů** konal se v Přerově 27. května 1912. v sále akciového pivovaru. Byl to vlastně sjezd pracovní, ale zároveň účinná manifestace v tomto městě tak význačném, ale hnutím esperantským nedotčeném. Tím více, že to byl sjezd mezinárodní, jehož se súčastnili esperantisté čeští, němečtí a polští (37 osob z 19 míst). Improvisovaná výstavka časopisů, knih a zajímavostí (které obětavě přivezli přátelé z Uherského Hradiště, Rožnova, Ivanovic, Bystřice pod Hostýnem a Prostějova), přivábila několik Přerovanů. Za čestného předsedu zvolen JUDr. Frant. Barvič, za výkonného p. Jos. Zlámal, za Poláky p. Franciszek Skulina, za Němce Rudolf v. Lidl, za Čechy slečna Mat. Minaříková, za sekretáře pp. Klement Urban a Antonín Šprinc, za revisory-pokladníky pp. Ant. Kudela a Bohuslav Ošťádal. Probrány otázky propagační, organisační, kongresové a jiné. P r o p a g a c e: Pojednáno o časopisech našemu hnutí nakloněných i nepřátelských. Usneseno, aby cizina byla před krakovským kongresem upozorněna na Moravu články v časopisech cizích a vydaným letáčkem aneb gvidlibrem, jehož redakce svěřena p. Rud. Fridrichovi, jenž vyzval všechny přítomné ku pomoci. Cizineckému svazu v Brně poslán projev díků za ochotu, s jakou vyšel vstříc akci moravských klubů stran díla „Moravské památnosti“, a doporučeno, abys ním byly udržovány styky pro případ možné společné práce. Rozhodnuto bylo, že se dopíše oběma ústředím pražským, aby reklamou laskavě uváděly ve známost esperantskou kolonii v Luhačovicích. Po návrhu JUDra Barviče bude poslána petice ministerstvu spravedlnosti o důležitosti esperanta při soudech. O r g a n i s a c e: Přijat návrh, aby pro usnadnění propagace a zvláštní potřeby země se založila samostatná moravská organisace bez újmy pražských ústředí. Přípravnými pracemi pověřeni přátelé z Rožnova. Odhlasováno memorandum pro „U. E. A.“ v Ženevě o rozdělení dosavadního distriktu ve dva, tak aby Morava (se Slezskem) tvořila distrikt samostatný. Při tom zdůrazněno, že se tak neděje z choutek odlučovacích, nýbrž pro usnadnění agendy, ježto dosavadní distrikt je příliš velký. Promluveno o sporu „U. E. A.“ s „Centra Organizo“. K o n g r e s o v é o t á z k y: Návrh zvláštního slovanského kongresu 1913 na Moravě nepřijat, za to doporučeno, aby schůzka moravská se konala každý rok a všemi hlasy přijat návrh, jejž podporovati mají pražská ústředí, aby roku 1915 byl konán kongres „U. E. A.“ v Praze. (Navrhl pan MUDr. Kubíček.) O slovanskou schůzku v Krakově slíbil pečovati pan

prof. Šprinc ze Zábřehu. Doktoru Zamenhofovi poslán k 25letému jubileu esperanta pozdravný dopis podepsaný všemi účastníky. Mimo to uctili kongresisté památku J. A. Komenského, který v Přerově prožil několik let. Krátké slavnostní řeči u jeho pomníku promluvili p. Krumpholc (česky) a p. Fridrich (esperantsky). Na pomník položena krásná kytice s esperantským nápisem na stuhách. Účastníci dali se fotografovati, přátelsky pobesedovali, a již končil tento památný sjezd tak milý všem účastníkům. Všichni se rozcházeli volajíce: Na shledanou v Krakově! *R. F.*

**O krajských organisacích českých esperantistů** jednal výbor „Svazu čes. esp." již r. 1910. Trváme, že neporušíme důvěrnost okružní knihy výboru, když z ní otiskneme tyto citáty: „Ježto jsme dosti od svého centra odříznuti, navrhuji zřízení esper. krajových organisací, které by velmi dobře mohly vzájemnými styky utužiti místní organisace. Připravuji . . ." (J. B. v Jihlavě, 28. srpna 1910.). „Prosím tě, příteli, zanech zatím té myšlenky krajských organisací, ať mezi nás nezaseješ zase neplodná hesla, která by mohla lidi másti. Horečka organisační je u nás dost velká, netřeba ji živiti; ubíjeti čas pracemi organisačními, když máme tak málo času na nutnou práci propagační, tedy na skutečnou práci, je prostě hřích. A tvořiti nové jednotky organisační, když je nás (rozuměj: českých esperantistů) všeho všudy pár tuctů, je skoro pošetilé. Styky mezi spolky možno přece pěstovati bez takovýchto formálních lapálií, které odvádějí lidi od vlastní věci a vedou je k titěrnému spolkaření. Bohužel naši lidé hned se chytnou; jak by někdo dal podnět, už bychom měli akci všude. Proto radím a prosím: zanech této myšlenky v čas!" (H. K. B. v Cejtičkách dne 4. listopadu 1910). *R.*

**Časopisecké rubriky o esperantu** mají informovati čtenáře neesperantisty — ať už myšlence příznivé či nepříznivé, nebo k ní lhostejné — a s tohoto stanoviska mají býti také redigovány. Mají podávati jenom to, co může zajímati člověka, který všímá si esperanta ne jako stoupenec jeho, ale jako člověk zajímající se o kulturní otázky doby současné, a mají to podávati tak, aby to bylo jasné a přístupné pro takovéhoto neesperantistu. V prvé řadě nejpůsobivější jsou zprávy o skutečných výsledcích praktického užití esperanta, v druhé řadě zprávy o úspěších a pokrocích jeho ve světě, pokud mohou poutati všeobecnou pozornost a buditi všeobecný zájem. Méně působivé jsou theoretické úvahy, jež proto nutno omeziti na zvláštní případy a příležitosti (nejlépe se hodí forma fejtonová). Bezúčelné je otiskování učebnice, které nutno trpěti jako nevyhnutelné zlo jenom tam, kde si toho výslovně přejí. Pochybené je uveřejňování esperantských tekstů, zejména tam, kde je nepředcházel esperantský kurs. Velmi dobré a účinné je uveřejňování překladů vážných prací z esperanta s poznámkou, že článek přeložen byl z jazyka mezinárodního. Zvláště působivé je uveřejňování vážných prací, k nimž materiál sebrán byl pomocí esperanta. Slovem: redakce těchto rubrik musí přihlížeti k *neesperantistům*, ne k esperantistům, pro něž jsou vydávány zvláštní časopisy. Je to něco podobného jako při popularisování věd: všechny časopisy přinášejí články ze všech možných oborů, ale obsahově tak volené a formálně tak podané, aby byly právě pro neodborníky a ne pro odborníky, pro něž jsou časopisy odborné. Rubrika o esperantu má býti prostě psána pro většinu čtenářů listů, a tou jsou jistě neesperantisté, i když esperantisté konají svou povinnost, že podporují listy přátelské esperantu. Z toho plyne zejména: v rubrice o esperantu nemá se ničeho napovídati, o čem může věděti (ač často ani neví) jenom esperantista, o čem však neesperantista může se jenom stěží informovati; nemá se glosovati a komentovati něco, o čem nebylo náležitě referováno; nemá se psáti o věcech, které mohou zajímati jenom esperantistu a pod. Konkretně rubrika o esperantu má obsahovati asi to, co přináší revue „Český esperantista" v rubrikách „Kronika a komentář" a „Informace a dokumenty". Tyto rubriky mají také býti českým propagátorům a informátorům pramenem, pokud nemají pramenů přímých. — Kdo zachová se dle zásad zde uvedených (jež zde rozebírati nemůžeme, ale jež šířeji rozvedeme jindy), může býti jist, že nechybí, i když nevylučujeme, že mnohý může přijíti na dobrou věc, na kterou my nepřišli. *Bšk.*

# JAZYKOVÝ RÁDCE.

**Nová slova esperantská** (z „Deutsch-Esperanto Wörterbuch" von P. Christaller)i
Baco = pac, čtyřkrejcar (druhdy hornoněmecká a švýcarská mince, nyní už v Ně-

mecku neužívaná). Ĉizeli = cizelovati, čekaniti, vyřezáváním, rytinami zdobit. (nádobí); na rozdíl od ĉizi = dlabati, dlátem rýti, dlátkem zpracovati, vydlabati, vytesati, vysekati, osekati. La ĉizelisto ne sole ĉizas: ĉizante oni forigas pecetojn de metalo; ĉizelante oni premfrapas la metalan suprajon per marteleto kaj ĉizelilo = Cizelér jenom nevydlabává: dlabáním odstraňují se kousky kovu; ciselujíce (čekaníce) vytepáváme kovový povrch kladívkem a čekanem (punzem, puncem, razidlem, rycí jehlou). Feno = jižní (polední) vítr; fojno = seno, fojni (ne: feni) = sušiti trávu. Firsto = hřeben střešní nebo horový hřbet (tegmentsupro, eĝo), Gimnasto = sokol, borec, turner, gymnast; gymnastiko = tělocvik. Grifono = noh (báječné zvíře, okřídlený lev s orlí hlavou); grifo = pinčlík opičí, opičák (canis gryphus, druh psů dlouhosrstnatých); kondoro = kondor americký (Sarcorhamphus gryphus). Hejmveo = touha po domově, stesk, tesknost, stýskání, nostalgie (nostalgio). Kripo = jesle, jesličky (vánoční), betlém; (best)manĝujo = jesle, koryto, žlab. Meceno (ne: mecenato) = mecenáš, podporovatel umění a věd. Nito = nýt (vinkto); nitmartelo (vinktomartelo) = nýtovač. Nuto = drážka, paz, žlábek, falc. Oferto = nabídka, oferta (ofro). Orangutano (ne: orangutango) = orangután (op). Publici = uveřejniti, publikovati; publicita = uveřejněný; publicisto = novinář, publicista. Reko = hrazda, hřada. Sekura = bezpečný, jistý, bezstarostný. Sitaco = papuch (papoušek). Ŝablono = šablona, sajma, skruž, křivice. Ŝlako = (s)truska, škvár hutnický, sor (skorio). Vespro (ne: vesproj) = nešpory. *Hkb*,

**Výklad slov často chybně zaměňovaných.** - 10. Aforismo, devizo, emblemo, maksimo, moto, proverbo, sentenco. *Aforismo* = aforismus, úryvek. Myšlenka, zásada stručně vyjádřená, čerpaná z díla znamenitého autora. *Devizo* = heslo. 1. Znak na praporu s krátkou, vysvětlující větou: La honoro kaj la patrujo = čest a vlast. 2. Krátká věta obsahující zásadu jednání: Facila internacia komprenebleco estas nia devizo = Snadná mezinárodní srozumitelnost je našim heslem. *Emblemo* = znak, odznak, symbol. Obraz předmětu nebo živé bytosti představující mravní nebo rozumovou vlastnost. La koko estas emblemo de la vigleco = kohout je znakem bystrosti. *Emblema* = znakový. Co má povahu znaku. *Maksimo* = zásada, pravidlo životní. Zásada, praktická rada pro život vyjádřená krátkou větou. *Moto* = motto, heslo. Věta citovaná z nějakého autora a položená v čelo díla nebo článku, aby vyjádřila jeho vůdčí myšlenku. *Proverbo* = přísloví. Krátká populární věta vyjadřující pravdu vypozorovanou lidem: Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faros = jen ten se nezmýlí, kdo nikdy ničeho nedělá. *Proverba* = přislovečný. Co je citováno často jako přísloví, takřka jako přísloví: La fideleco de la hundo estas proverba = věrnost psa je přislovečna. *Sentenco* = sentence, (závažný, obsažný) výrok, myšlenka. Krátká věta obsahující krásnou mravní myšlenku, hlubokou pravdu životní: sentenco de Seneka = průpověď Senekova. — 11. Agi, fari, konduti, manipuli, procedi. *Agi* = jednati, počínati si. Užiti svých tělesn. i dušev. sil: Ne ploru, sed agu = neplač, nýbrž jednej. *Ago* = čin, akce. Užívání svých tělesných nebo duševních sil: Malpli da vortoj, pli da agoj. Méně slov, více činů! *Fari* = činiti, dělati, způsobiti, aby něco bylo, se stalo; vytvořiti, produkovati: fari tablon = (u)dělati stůl, fari versojn = dělati verše, fari miraklon = učiniti zázrak. Dio kreis la mondon el nenio = Bůh stvořil svět z ničeho. *Fariĝi* = státi se. Přejíti v nový stav; přejíti z jednaho stavu do druhého: fariĝi maljuna = sestárnouti, fariĝi esperantisto = státi se esperantistou. *Faro* = čin, dílo, skutek. Čin toho, kdo dělá. Juĝu laŭ faroj, ne laŭ vortoj = suď dle skutku, ne dle slov. *Bonfaro* = dobrý skutek, jenž pomáhá bližnímu. *Bonfaranto* = dobrodinec, dobroděj. Člověk prokazující dobro, pomáhající bližnímu. *Konduti* = chovati se, vésti si, počínati si, jednati (jak). Jednati v souhlase nebo v odporu s pravidly dobrého mravu, slušnosti: La knabino kondutis neriproĉinde dum la tuta servado = děvče po celou dobu chovalo se k úplné spokojenosti. Konduto = chování, počínání, jednání. Způsob jednání (souhlasný nebo odporující pravidlům dobrého chování a slušnosti). Bonkonduta = dobrého chování. *Manipuli* = manipulovati, zacházeti, nakládati (s něčím). Užívati rukou, když se něco dělá, když se užívá nástroje. *Procedi* = postupovati, počínati si, zacházeti, nakládati s činy. Užiti zvláštních prostředků k dosažení cíle. *Procedo* = postup(ování), průběh, proces. Zvláštní počínání přizpůsobené cíli: ĥirurgia procedo = chirurgický proces, výkon. — 12. Agiti, propagandi., *Agiti* = agitovati. Povzbuzovati jiné, aby jednali pro účely, cíle, mající veřejnou důležitost: agiti antaŭ elektoj = agitovati před volbami. *Agito* = agitace = konání toho, kdo agituje. *Agitanto* = agitátor. Osoba, jež

agituje. *Propagandi* = propagovati, šířiti. Snažiti se rozšířiti, zpopularisovati myšlenku, nauku: propagandi esperanton = propagovati (šířiti) esperanto. *Propagando* = propagace, propaganda. Snaha rozšířiti...: propagando de abstinenco = propagace abstinence. *Propagandisto* = propagátor. Člověk, který se zabývá propagací. — 13. Agrafo, broĉo, buko, pinglo. *Agrafo* = sponka, háček, petlice. Kovový háček s kroužkem sloužící k spojení dvou krajů oděvu. *Agrafi* = zapnouti háček. *Broĉo* = brože. Ozdoba ze zlata nebo stříbra a drahokamů se špendlíkem: La broĉo estas juvelo portata de virinoj = Brož je šperk, jejž nosí ženy. *Buko* = přezka. Kovový rámeček s pohyblivým špendlíkem k spojování částí oděvu: buko de zono = přezka pásu. *Buki* = zapnout přezku. *Pinglo* = špendlík, jehlice. Ostře špičatý kousek tenkého drátu k upevnění částí oděvu: pinglo, duobla pinglo = vlásnička, amerika aŭ sendanĝera pinglo = americká nebo bezpečná jehlice. — 14. Akcidento, hazardo, okazo. *Akcidento* = nehoda, neštěstí. Událost nešťastná, nepříjemná a neočekávaná: fervoja akcidento = železniční neštěstí; laboristo vundita de akcidento = dělník zraněný při neštěsti. *Akcidenta* = náhodné a nešťastné, nepříjemné. *Hazardo* = náhoda, štěstí. 1. Hra, jejíž výsledek závisí na náhodě, štěstí a ne na umění účastníků a jejímž hlavním účelem je vydělati peníze: ruleto (rouleta) 2. Událost nezávislá na našich snahách, na naši vůli. Hazardo estas malbona gardo = Náhoda je špatným strážcem. *Hazarda* = náhodný, hazardní. Založený na náhodě: hazarda ludo = hazardní hra, hazarda solvo de problemo = náhodné rozřešení problému. *Okazo* = událost (příběh, příhoda, případ); příležitost, náhoda. 1. Co se děje, dělo. 2. Šťastná událost, příhoda, umožňující něco udělati: Mi ne havis okazon paroli esperante kun fremduloj = neměl jsem příležitosti mluviti esperantem s cizinci. *Okazi* = státi se, udáti se; potkati, přihoditi se; zběhnouti se, býti, díti se, odbývati se. Skutečně býti, opravdu se státi, nezávisle na naší vůli. La katastrofo okazis antaŭ cent jaroj. Katastrofa udála se před sto lety. *Okaza* = náhodný, nahodilý, případný. Co se děje, co je založeno na náhodě, příležitosti: okaza eltrovo = náhodný, příležitostný vynález. — 15. Akra, akuta. *Akra* = ostrý. 1. Co má tenké ostří: akra tranĉilo, glavo, tondilo = ostrý nůž, meč, nůžky. 2. Jehož strany se spojují v malém úhlu: akra rando = ostrý okraj. 3. Co silně dráždí smysly: akra manĝaĵo, malvarmo, sono, voĉo, odoro = ostré jídlo, zima, zvuk, hlas, akra koloro = křiklavá barva. 4. Přísný, nezdvořilý: akraj vortoj = ostrá slova. *Akreco* = ostrost. Vlastnost toho, co je ostré. *Akrigi* = ostřiti, brousiti. Dělati něco ostrým: akrigi tranĉilon = brousiti nůž. *Akrigilo* = brus. Kámen, předmět k broušení. *Akuta* = náhlý, prudký, akutní. Ne dlouho trvající, provázený silnými příznaky (o nemocech) akuta kataro: prudký zánět. *Rud. Hromada*

# ZPRÁVY SPOLKOVÉ.

**První dámský český spolek esperantský v Praze** konal 2 května 1912 svou VIII. valnou schůzi. Ze zprávy jednatelské budiž uvedeno: spolek pořádal během roku 2 bezplatné kursy konversační (uč. pí Krausová), pro začátečníky (uč. sl. Šupichová), stal se podílníkem společnosti k vydávání časopisu „Český esperantista", podnikl vycházku na výstavu Alešovu a snažil se, aby poskytl členkám možnost ke zdokonalení se v esperantě. — Při volbě výboru zvoleny byly: za předsedkyni pí Krausová, za místopředsedkyni pí Horelová, za jednatelku sl. Šupichová, dále sl. Fiedlerová a sl. Sobotová; náhradní: pí Biskupová a sl Ševčíková, revisorkami sl. Bauerova a sl. Morávkova. Pí předsedkyně Krausová vyslovila jménem všech díky obětavé sl. Studničkové, která byla po 8 let předsedkyní spolku. Přijat návrh sl. Knittlové, aby byla sl. Studničkova zvolena čestným členem. — Dotazy a dopisy přijímá jednatelka sl. Julie Šupichova, Praha II. 522, Ječná ul. 36 n.

**Pro propagační fond „S. č. e."** věnovali: Nejmenovaná v Praze K —·20, pí P. v Hořicích (prohraná sázka) K 0·20, Kroužek esp. v Hořicích K —·90, sl. Julie Šupichova, učitelka v Praze K 10·—, p. Rud. Fridrich, profesor v Prostějově K 10·20. sl. M. Knittlova K 20·—, p. Vojtěch Kraus, přednosta pražského adresáře K 30·—, Následujte!

Majitel dr. Stan Kamaryt. Zodpovědný redaktor a vydavatel H. K. Bouška.
Tisk fy F. Simon a spol. ve Dvoře Králové n. L.